
La Gazeto Andaluzia

Andaluzia per si por Hispanio kaj la Homoj

N-RO 11 *3-a JARKOLEKTO APRILO-86

n-ro 2 deponita en DL MA- 1.136/85



en

GRANADO...



... 15a / 17a Aŭgusto

1986

4-a

ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO

Gazeto Andaluzia

Fondita en 1910

de D. JOSE GARZON RUIZ

Oficiala Organo de A.E.U.

EDITA - ELDONAS
Asociación Andaluza de Esperanto

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Inscrita en el Registro de Asociaciones del Ministerio del Interior del Estado Español con el número 56.173

ENHAVO

- En Granada 1
- Informoj 2
- Akademio 8
- Jaeno 9
- La historia Àrĥivo ... 11
- Kia propagando 12
- Kongreso 0

"La opinioj ĉi tie verkitaj apartenas nur al la sbskribantoj"

Presita ĉe MALAGO

Kompilanto: J. Herrero.

REDAKTOROJ

Alberto Franco Ramirez. Sevilla.
Andrés Martín Gonzalez. Málaga.
J.M. Rodriguez Hernandez. Córdoba

ADRESOJ

- Grupo Esperanto IB "Séneca"
  Apartado de Correos 611
  14080 CORDOBA.

- Centro Cultural G.F.U.
  Trinidad Grund, 28 2º
  29001 MALAGA.

- S.E.J.O.
  Pozo, 3
  41003 SEVILLA.

- Grupo Esperanto
  Santa Cruz, 9 3º A izqda.
  18003 GRANADA.

- Asociación Sevillana de Esperanto.
  Sol, 75
  41003 SEVILLA.

- Grupo Esperanto
  Universidad Popular
  TORROX (Málaga)

- Grupo Esperanto
  I.B. "Julio Rodriguez"
  MOTRIL (Granada)

EN GRANADA

Antaŭ nia 4a Andaluzia Kongreso de Esperanto okazonta la venontan aŭguston en Granado taŭgas atentigi ĉiujn AEU-anojn pri la graveco de la proksima jara renkontiĝo de nia organizo, fronte al la Centa Datreveno de nia kara lingvo. Tutmonde, la esperantistoj maltrankviliĝas kaj pretas fari ion interesan okaze de tiel elstara evento por ĉiuj homoj.

Ci tiun someron ni havos la ŝancon sugesti, diskuti kaj decidi la esperantan agadon realigotan en Andaluzio ekde la Kongreso ĝis la fino de la jaro 1.987a. Tial estus bedaŭrinde, ke la pli-malpli granda nombro da ĉeestantoj ne atingus ŝatindan rezultaton pro manko de ĉies kunlaboro. Nepras, do, sciigi ĉiujn pri iuj rimarkindaĵoj meditendaj. Plie, ĉar oni ricevos ĉi tiun numeron de "Gazeto Andaluzia" multajn tagojn antaŭ ol la okazigo de la Granada Kongreso, ĉiu AEU-ano respondeca - kaj mi opinias, ke ĉiuj estas tiaj - pripensu la aferon kaj pretigu sian petatan partoprenon. Se, pro ajna motivo, vi ne ĉeestos la Kongreson, sendu al la poŝta adreso de AEU en Málaga viajn respondojn al la jenaj demandoj:

1) Kiom da samideanoj troviĝas en via vilaĝo/urbo?
2) Kiom da personoj lernis Esperanton en via vilaĝo/urbo dum ĉi tiu lernojaro?
3) Kiom da fojoj aperigis vi (izole aŭ grupe) informojn, artikolojn, ktp, en la lokaj komunikiloj?
4) Bonvole klarigu vian sintenon rilate al la Meza Kurso de AEU
5) Kion vi opinias pri la senpera estonteco de A.E.U.?
6) Konkrete, kion vi faros en via vilaĝo/urbo por okazigi digne la Jubileon de Esperanto?
7) AEU aranĝas, inter aliaj, la estigon de Supera Esperanto-Lernejo funkcionta ekde la aŭtuno de 1987a, ĉu vi pretas profundigi viajn konojn pere de tiu lernejo?
8) Ne nur unuope sed ankaŭ grupe necesas agadi, do, kion vi atendas, ke AEU plenumos okaze de la Centa Jariĝo de Esperanto

Cerbumu pri la demandaro kaj respondu kiel eble plej amplekse. Nia organizo bezonas ĉies helpon ĉar ĝi apartenas al ĉiuj.

Ni sukcesos kune, tute certe.

Salutojn.

Informoj



K O R D O V O
= = = = = = =

- En Februaro vizitis nin David T.Ryan, juna samideano de Nov-zelando JD en Chirstchurch. Li restis en nia urbo dum 4 tagoj por viziti jordovan korespondantinon. Li parolis al ni pri sia lando kaj eĉ dancis kelkajn tipajn maoriajn dancojn. Ni tre - ĝojis kun lia vizito ĝisrevidante lin ĝis la proksima jaro.

- Dumpaske vizitis Kordovon 2 junaj samideanoj de FR Germanio, ĉekoslovak-devenaj, ili restis en nia urbo nur dum unu nokto, ni helpis ilin trovi taŭgan dormlokon.

- La elementa kurso de Esperanto, kiu ĉiujare okazas ĉe la Gimnazio SENECA daŭrigas. La 13 novaj gelernantoj finos la kurson en Majo, kaj kelkaj deziras ĉeesti la Granadan Kongreson aŭguste.

- Okazis dum la monato Aprilo en Kordovo la Hispana Kongreso pri Lingvistiko, organizata de la Hispana Societo pri Lingvistiko kunlabore kun la angl-lingva Departemento de la Kordova Universitato. La ĉi-jara temo estis desegnata de nia kara amiko esperantano Jesus Mayora, kiu profitis la ŝancon meti sur la afiŝon la temon de la Kongreso en pluraj lingvoj, inter ili ankaŭ en esperanto.

- Tre eble dumsomere oni profitos la liberan tempon por kunordigi la laboron de la geesperantistoj en Kordovo. Tiel eble oni preparos en Julio la statuton de la Kordova Esperanto-Asocio, oni ankaŭ daŭrigos la presadon de "LA KORDOVA ESPERANTISTO" iom dormita lasttempe, kaj fine ni pripariĝos por prezenti inde ĉe nia urbo la Centjariĝo de nia lingvo.

- La pasintan 5-an de Aprilo la Moŝta s-ro Mokhtar M'Bow, ĝenerala direktoro de UNESKO, prelegis en la Urbodomo de Kordovo pri la temo "Internaciaj Rilatoj kaj Paco en la Mondo". La konferenco estis organizata de la urbestraro kiel fino de serio da prelegoj pri la Paco. (daŭrigas).

Kiam finiĝis la konferenco oni malfermis vicon por demandoj. Krom la demandoj pri la forlaso de la UNESKO de Usono kaj Britio, kaj pri la helpo de ĉi internacia organizo por Nikaragvo, s-ano Jose Mª Rodriguez demandis al la ĝenerala direktoro pri kiel internacia lingvo povus helpi la disvolvadon por tutmonda kaj kionsupozis por la UNESKO la du rezolucioj adoptitaj de la Generala Asembleo favore al Esperanto. Moŝta s-ro M'Bow respondis la jenan demandon dirante ke li konstante rilatas kun esperanto-asocioj, kiuj troviĝas ankaŭ en la Generala Asembleo de UNESKO, same li diris ke esperanto estas gravega por la internaciaj rilatoj, kaj ke malgraŭ la lingvaj imperialismaj baroj, Esperanto devas ludi specialan rolon. Fine li parolis pri sia ĉeesto en kelkaj E-kunvenoj, dankante la konstantan helpon de la E-Grupoj al la UNESKO.Estis grave aŭskulti s-ron M'bow paroli pri Esperanto ĉar la Konferencon ĉeestis la tuta urbestraro , la civila provincestro kaj multaj kordovaj aŭtoritatuloj. Oni sendos artikolojn pri ĉi tiu konferenco al "Boletín", "Heroldo" kaj "Esperanto".

==========

J A E N O

- De ningún modo el movimiento esperantista está dormido. Según informaciones del Curso por correspondencia de AEU, el número de alumnos de esta provincia aumenta. Y no sería de extrañar que pronto hubiera una reunión de los esperantistas de Jaén para empezar a relacionarse y hacer algo en común. AEU y G.A. (especialmente el Grupo de Córdoba) aprovecha esta ocasión para ofrecer a los esperantistas de esta provincia nuestro apoyo y colaboración.

- S-ano J.M. Rodriguez, kordov-jaena, diris al ni ke ne estus tute maleble okazigi Andaluzian Kongreson de Esperanto en Jaeno por la jaroj 89-a aŭ 90-a,se ĉiuj E-Grupoj de Andaluzio kunlaboras por tio, kiel en la ĉi-jara Granada Kongreso.

(daŭrigas)

- Dumsomere oni eldonos la unuan specialan numeron de Gazeto Andaluzia dediĉata al ĉiuj andaluziaj provincoj. Ĉi specialaj numeroj aperos po unu jare, kaj ĉiujare estos dediĉata al unu provinco. Ĉi-kaze en 1986 al Jaeno. Gi estos eldonata de AEU kun la helpo de la Kordova Grupo, pliaj informoj aperas en artikolo "La specialaj numeroj de G.A.." en ĉi sama revuo.

Fine ni ne povas forgesi kaj silenti ke la ĉefa organizanto de la ĉi-jara Andaluzia Kongreso de Esperanto en Granado estas jaenano, temas pri nia ĉarma kaj kara amiko Juan Ignacio Bravo Lupiañez de Alcalá la Real.

- ¿SABIAS QUE...
la primera y, creemos que hasta ahora, única persona que ha llevado el nombre de Esperanto, y no como seudónimo, era andaluz? Pues sí, el primogénito de D.José Garzón Ruiz, fundador de esta revista, recibió el nombre de Esperanto. Desconocemos que fue de él, (tampoco sabemos cuando celebraba el dia de su santo)

- La revista "Córdoba Comercial" editada en Córdoba durante los años 20 por dos agentes comerciales, esperantistas, los sres. Serrano Olmo y De Obregón llevaba la siguiente cabecera en 6 idiomas, entre ellos también es Esperanto: "A las casas extranjeras. Correspondemos en varias lenguas, pero para nuestras relaciones con el extranjero, preferimos siempre el esperanto, idioma internacional".

Notas facilitadas por: Historia Arñivo de AEU
Apartado 611, E-14080 CORDOBA.
"Je la servo de la Andaluzia Esperantista Kulturo".

A T E N C I O N
= = = = = = = = =

- Si deseas tener una copia de la foto del 1er Grupo Esperantista Andaluz, San Fernando (Cádiz) 1910, escríbenos enviando 6 sellos de 17 pts. Se trata de una foto 11 x 17 de calidad, en blanco y negro.
"Historia Arñivo de A.E.U. - Apartado 611
E-14080 CORDOBA.-

S E V I L J O

- Pri "Ĵaŭdaj Parolhoroj" vi povos legi aparte.

- S.E.J.O. ricevis laste leterojn el Pollando, Hungario kaj Irano kun korespondpetoj, el Svislando kaj Bulgario propagandcele kaj el la revuo "Muy interesante" ni ricevis kunlaborpeton.

- Dum la fino de la pasinta jaro ni partoprenis en "Expo-Juventud '85", ekspozicio por la junularo pri ĉiuj temoj, aranĝita de la Urbodomo. Ni havis spacon en la "stando de presaĵoj", kie ni montris niajn revuojn kune kun aliaj hispanaj revuoj kaj ĵurnaloj. Krome ni pendis grandan afiŝon kun esperantaĵoj. Post tiu aranĝo granda nombro da personoj interesiĝis pri esperanto kaj vizitis aŭ skribis al nia klubo.

- Nia prezidanto ĉeestis la kurson pri "Organizado de junularaj asocioj" aranĝita de la Autonoma Kon-oma pri kulturo, kaj sukcese trapasis la koncernan ekzamenon.

- SEJO kunlaboras kun la Asocio de Andaluziaj Kooperativoj, tial, ke unu el niaj membroj estas elektita prezidanto. Tiu asocio kreos esperantan sekcion kaj kontaktos la Internacian Asocion de Esperantaj Kooperativistoj baldaŭ kreiĝonta.

- Unu el la redaktoroj de "ĉiesrevuino" foriris por plenumi la armeservon, kaj pro tio prokrastiĝis la eldono de la lasta numero de nia revuo. Ni petas pardonon al niaj abonantoj kaj legantoj.

- Dum la okazado de la "Sevilja Foiro" vizitis nin du hungaraj samideanoj, kiuj restis tie ĉi tiun semajnon.

Ĵ A Ŭ D A J P A R O L H O R O J

- Komenciĝis la jaro 1986, kaj S.E.J.O. ankoraŭ daŭrigas la okazadon de la tiel nomataj "Ĵaŭdaj Parolhoroj" t.e., speco de prelegoj en esperanto sekvitaj de debatoj far aŭskultantoj kaj prelegantoj, kiuj okazas ĉiun ĵaŭdon vespere de la 21-a ĝis la 22-a. Tiel ni vigligas nian esperanto-paroladon kaj krome sciiĝas pri tre interesaj temoj. ĝis nun malmultaj kuraĝis gvidi horojn sed espereble tiu nombro baldaŭ altiĝos.

Krome ni intencas eldoni antologion kun la enhavo de la plej interesaj "Ĵaŭdaj Parolhoroj" okazintaj. En ĉi tiu dua etapo okazis jenaj aranĝoj:

- 9an de Januaro: Luis Gilperez, aŭtoro de libro pri ŝnuroj en la hispana, kiu enhavas vortaron fakan esperanto-hispanan, oficiale prezentis al ni la libron kaj parolis pri "Montistaj ŝnuroj".

- 16an: F.A. Antunez (plej konata kiel Pako la tria) parolis al ni denove pri Algebro de Boole. Cirkvitoj, pordoj kaj Morgan entuziasmigis nin tiuvespere.

- 23an: Antono Rodriguez ŝajnis havi specialan plezuron parolante pri katastrofoj. Naturaj katastrofoj II estis la titolo de la prelego. Tertremoj, pluvegoj, katastrofevito, ktp. trenigis nin tiuvespere.

- 30an: Alberto Franco parolis pri "Enkonduko en la esperanta fonetiko. Oftaj eraroj de la Iberiaj esperantistoj". Denove la problemo b-ploziva aŭ b-frikativa, n-nazala aŭ n-velara, ktp. Certe la buŝo de la aŭskultantoj deformiĝis pro ĝusta elparolado tiuvespere.

- 27an: Reaperas Luis Gilperez (Luizo) kiu parolis al ni pri la arto vojaĝi ĉipe kaj sporte ĝoji la pejzaĝon, t.e. la cikloturismo.

NI INFORMOS PLUE. ĜIS!

I M P O R T A N T E
= = = = = = = = = =

Toda la correspondencia dirigida a AEU (Asociación Andaluza de Esperanto) en Málaga, debe ir a la siguiente dirección: Apartado 3275 29080 MALAGA.

46º CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO
Vigo, 15 al 20 de julio 1.986

Konkurso

UNUA TABLOTENISA KONKURSO "LA MALFELICA KROKODILO"
==========

Andaluzia Esperanto-Junularo organizos dum la 4-a Andaluzia Kongreso de Esperanto en Granado turniron de tabloteniso.

- Partoprenantoj: ĉiuj ĉeestantoj de la Kongreso kiuj deziros partopreni.

- Aliĝ-kotizo: 100 ptoj., se necesus, se ne, oni ne petos ĉi mon-kvanton.

- Premioj: Du malgrandaj trofeoj, por la ĉampiono kaj por la subĉampiono.,

- Pliaj informoj: Andaluzia Esperanto-Junularo
Apartado 611 E-14080 Córdoba.

LA SPECIALAJ NUMEROJ DE G.A.
==========

- Treeble dumsomere AEU, kun la helpo de la Kordova - Grupo, ekeldonos serion da specialaj numeroj de GAzeto Andaluzia, oni dediĉos ĉiun numeron al unu andaluzia provinco, la unua, kiu aperos en 1986, estos dediĉata al Jaeno.

Per ĉi tiuj revuoj ni esperas disvastigi la Esperanto-movadon de ĉiuj andaluziaj provincoj, kune kun ĝiaj allogaĵoj, vizitindaj lokoj, festoj, ktp. Pro tio ni esperas ricevi artikolojn, ĉu hispane ĉu esperante, de la ĉiuprovincaj samideanoj.

Do, karaj JAENaj amikoj se vi volas sendi al ni artikolojn, ne necesas nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri via urbo, pri ĉio, adresu rekte al :

Kordova Esperanto-Grupo
Apartado 611
E-14080 CORDOBA

I M P O R T A N T E
= = = = = = = = = =

La nueva dirección de A.E.U. en Málaga es:
Aparatdo 3275 29080 MALAGA.

A K A D E M I O

OFICIALAJ INFORMOJ DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

==========

Sendependa lingvo-instituto fondita de D-ro Zamenhof en 1905

La Akademio vokas ĉiujn Esperantistojn doni sian atenton al la jenaj REKOMENDOJ PRI LA LANDNOMOJ :

1) Pro respekto al la tradicio, kaj en pacema spirito, ni deklaras, ke landnomo estas taŭga, se ĉiuj aŭ la granda plimulto senkonteste uzas la saman formon.

2) En okazo de konflikto inter du aŭ pluraj formoj por unu sama landnomo aŭ inter la uzo de kategorio aŭ la alia por unu sama radiko, la Akademio rekomendas preferi la plej internacian landnomon kaj tiel obei al la 15-a Regulo de la Fundamento.

3) La Akademio rekomendas konsideri, ke la signifo-rilatoj inter la landnomoj kaj la koncerna landano-nomo ĉiam estas principe la samaj, kiu ajn estas la kategorio de la landnomo. Ekzemple, Angl-ujo/-io- Angloj kaj en la alia kategorio Nederland-o- Nederland-anoj.

4) Principe estas malrekomendite nove formi nomon per iu internacia "sufikso" aŭ sufikse uzata fremda vorto (-io, -(i) stano) se la tiel ricevita landnomo ne jam ekzistas internacie.

Rimarkoj de la Prezidanto:

1) Per tiuj rekomendoj la Akademio esperas marki la finon de la diseriga tendenco en la landnomoj. Devus instaliĝi tendenco al unuecigo farita sur sana bazo tradicia kaj Fundamenta.

2) Ni memorigas, ke la Akademio jam publikigis liston de 32 landnomoj kaj de 15 landano-nomoj en la Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro (Aktoj de la Akademio, II, p. 13-14).

Tiuj nomoj aldoniĝas al la kelkaj nomoj troveblaj en la Fundamento. Ciu disciplinema Esperantisto severe atentos tiujn listojn.

3) La Akademio ne intencas oficialigi pliajn nomojn. Sed ĉar oni diversflanke petis tian paŝon, ĝi decidis anstataŭe starigi liston de "normaj" landaj kaj landanaj nomoj, kiu povos subiĝi al revizio, kiam necesos.

(D-ro A.Albault, 21, rue de Verfeil, F-31200 TOULOUSE Francio.)

JAENO

Alfonso Escamilla Roa

Ekde kiam aperas nova ekzemplero de nia "GAZETO ANDALUZIA", mi rapide okulumas ĝiajn paĝojn. Eble vi demandos kion mi serĉas tiel avide. Certe mi deziras trovi grandlitere skribita, kapnovaĵe, la nomon JAENO - mia provinco -, kiel same aperas en ĉiuj numeroj SEVILJO, KORDOVO, MALAGO, k.t.p. Kredu karaj gesamideanoj ke mia vizaĝo ruĝkoloriĝas kiam mi ne trovas la nomon serĉata.

Sed, JAENO entenas esperantistojn, kiuj de longtempe, defendas, propagas kaj gloriigas nian lingvon. Tiam, kial ili ne vivsignigas? Mi kredas ke la plej signifa kialo estas la maljuneco de preskaŭ ĉiuj. La maljuneco estas la plej malbona amiko por ĉio, kaj eble, en tiu ĉi kazo ĝi estu la malevita kaŭzo kiu obstaklas niajn bondezirojn favore al Esperanto.

Dum mia juneco mi laboradis senlace. La ĵurnalo "JAEN" estas reala provaĵo de mia jeso. Ekde proksimume 20 jaroj ĝiaj kolumnoj propagandis miajn poresperantajn verkartikolojn. En mia plenaĝa stato, ankaŭ energie, laboradis, kaj eĉ en mia maljuneco, kuraĝeme, mi klopodis por atingi gvidadon de Esperanto -Kurso en mia loka Popola Universitato. Post du jaroj de mia peto ankoraŭ mi atendas pravigan pretekston por ĝia rifuzo.

Pli antaŭe ankoraŭ, mi proponis prelegi pri Esperanto en la Kulturdomo de nia ĉefurbo. Tiel la Direktoro kiel aliaj estraranoj elmontris evidentan plaĉon pri tia novaĵo. Mi, emociita atendis la alvokon..., prokrasto post prokrasto, ĝis nun. Sed, ne ĉiam malsukcesis mi, do, mi prelegis pri Esperanto en la tiama Sindikata Domo en Linares. La sukceso de tiu prelego estis tre bone rimarkita por Libro-Servo de HEF, kiu vendis multajn lernolibrojn.

Jaeno havis, ekde longtempe, gravajn defendantojn de Esperanto. Mi deziras nun, oferi al ĉiuj ili, kiel merita omaĝo, enskribi iliajn nomojn en Honora Kadro. Jen estas kelkaj el ili (mi ne rememoras ĉiujn. Pardonu min), ĉiuj forpasitaj:

- D-ro Gabrielo Arroyo Sevilla
- S-ro Emanuelo Anguita Galán
- S-ro Jozefo Montiel Villar
- S-ro Sebastiano Alcázar

Nuntempe la tri fratoj UCEDA FLORES konataj de la Andaluzia Esperanto estraro, kaj aliaj multaj, kiuj kuŝas en la forgesita ombro, eble atendante lumradion kiu lumigu iliajn dormatan esperantistan fidon.

Alvenas al mia memoro la artikolo kiun Esperanto Grupo IB Séneca de Kordovo en ĝia revuo "La Kordova Esperantisto" n-ro 4-a, oferis al la esperantistoj de Jaeno. En ĝi, ili petis al ni vekiĝi de nia jam tre longa kaj profunda dormado kaj partopreni en la aktiva movado kaj propagando de Esperanto. Tiam mi kaptis la defion kaj mi volis, unuflanke, ripeti mian junan akti vecon, sed mi observis ke ne estas facile reatingi la ne saveblajn energiojn de la juneco. Pro kio, mi ne povas fari ion alian ol deklari min muezinon kiu de mia gvatturo alvokas la tutan jaenan esperantistaron, ke ili kuru al la gesamideana renkontiĝo kiu sencese laboradas por ke pere de Esperanto kaj Andaluzio, reĝu la deziregan Pacon en la Mondo, por la interkomprenado de ĉiuj.

59-a SAT-Kongreso de Esperanto

Sant Cugat del Valles

2-a ĝis la 8-a de Augusto 1986

42-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE ESPERANTO

Neurim, Israelo, 14/21 Augusto 1986

4-a ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO

Granado, 15/17 Augusto 1.986

U L T I M A N O T I C I A
= = = = = = = = = = = = =

Según nos comunica nuestro socio José Ignacio Bravo, presidente del Comité Local Organizador, la sede para el "4º Congreso Andaluz de Esperanto" es la Facultad de Ciencias, de la Universidad de Granada.

LA HISTORIA ARĤIVO DE A.E.U.

Estimataj gesamideanoj:

La arĥivo bezonas vian helpon. Ĉiuj geesperantistoj en Andaluzio, prefere tiuj plej maljunaj posedas riĉan kolektaron da memoroj tre gravaj por estonta historio de la Andaluzia E-Movado. Ni ne petas ke vi sendu al ni vian plenriĉan aron da kolektaĵoj, sed ni petas ke vi informigu al ni prio ĉio kion vi trovos interesa por diskonigi. Oni ne devas forgesi la nomojn de tiuj samideanoj kiuj bedaŭrinde jam mortis, ankoraŭ kelkaj amikoj memoras iliajn nomojn, agadojn por la internacia lingvo.

Same ni volus havi fotokopion de ĉiuj ĵurnaleltranĉaĵoj kie aperas E-o informoj, ni jam havas preskaŭ ĉiujn kiuj aperis post 1982a, sed ankoraŭ mankas multaj al ni. Ĉi tiu arĥivo, kiu dependas de AEU ankaŭ komencis kolekti E-fotojn, t.e. fotoj de E-kunvenoj, kongresoj, ktp. Se vi havas iun interesan informon por ni, ne temas pri la sendado de fotoj, nur informu al ni kaj se la foto estas interesa (preskaŭ ĉiuj estas) ni pagus kopion.

Do, kara amiko, kiel vi povas vidi, la Arĥivo de A.E.U. laboras, ni esperas prezenti al la andaluzia samideanaro niajn aĵojn, kiuj estas ĉies, okaze de la 4-a Andaluzia Kongreso de Esperanto.

Mi antaŭdankas vian kunlaboron.

La Arĥivestro de A.E.U.

Kia ProPagando!

Vi povis legi en la informa paĝo sub la provinco KORDOVO, ke antaŭ kelkaj semajnoj vizitis ĉi urbon du junaj samideanoj de FR Germanio, kvankam ili naskiĝis en Cekoslovakio. Ili restis en nia urbo nur unu nokton sed mi profitis ĉi viziton por konversacii kun ili, kompreneble esperante.

Dum ĉi tiu interparolado mi demandis ĉu ili konis ion pri Andaluzio. "Ne tro multe" ili respondis, "nur la marbordon, la taŭroluktojn, la belajn virinojn, la ŝerean vinon, ktp.". "Perfekte", mi pensis, mi vidas ke Andaluzio estas profunde (?) konata trans la Pireneoj. "Kaj pri Kordovo, ĉu vi konis ion pri mia urbo?", mi sekve demandis. "Ankaŭ ne tro multe" ili rapide respondis. "Ĉu la Moskeon?", mi demandis. "La Moskeon, kio estas tio?", ili diris. "Bone, se vi ne konas la famegan araban Moskeon, eble vi aŭdis ion pri Medinat' al Zahro, pri la Kordova Alkazaro, aŭ pri alia araba monumento de mia urbo, ĉu ne?" "Tute ne" ili respondis al mi.

Mi pensis tuje en ĉiuj kordovaj tipaĵoj, eĉ en tiuj pli modernaj, kaj diris: "Nu, ĉu ion pri la Sankta Semajno, la Montilja vino, la virinoj pentritaj de Julio Romero, la Majaj Festoj, la filozofo Seneca, la kontoj de l'Granda Kapitano, la komunisma urbodomo, la Guadalkivira Rivero, la zoologia Parko, la Romia Ponto, la taŭroluktistoj Manolete aŭ El Cordobés, la flamenka kantado, la gitaroj, la floroj, ktp. ktp, ĉu ion pri Kordovo?" Mi preskaŭ kriis. "Ne, nenion pri ĉi ĉio" ili diris. Mi enfundigis sur la konforta seĝo kaj tute disbatita mi fine, lastsopire, demandis "karaj samideanoj, ĉu vi aŭdis paroli iufoje pri Kordovo?". "Jes" ili respondis al mi. "Perfekte" mi pensis, ne ĉio estas perdita". Ili rakontis: "En Germanio kelkaj personoj diris al ni ke en Kordovo estas tre danĝere parki la aŭtomobilojn surstrate, ĉar estas multaj ŝtelistoj".

Mi, aŭdinte ĉi tion, preskaŭ freneziĝis, la unu-nura afero konata en la mondo pri Kordovo estas la ŝtelistoj (se almenaŭ la stelistoj) mi pensis.

KIA PROPAGANDO!

J.M.R.H.

K O N G R E S O

4º KONGRESO ANDALUZ DE ESPERANTO

- GRANADA, 15,16 y 17 de agosto de 1.986
- SEDE: Facultad de Ciencias de la Universidad de Granada.
- TEMA CENTRAL: "A.E.U. ante el Centenario del Esperanto".
- PROGRAMA: El que aparece en la hoja adjunta.
- INSCRIPCION: Rellena la hoja adjunta y enviala a AEU Málaga (Apartado 3275, 29080 MALAGA). La cuota puedes remitirla por giro postal o cheque a dicho apartado o directamente a la Cuenta Corriente nº 1895-8 de la AEU en la Caja de Ahorros Provincial de Málaga, oficina principal.
- ALOJAMIENTOS: Informaremos en el "AEU-Informilo" del mes de julio, sobre las diferentes posibilidades de alojamiento durante los dias del Congreso.
- PONENCIAS: Hasta el 10 de Agosto puedes enviar a AEU Málaga las propuestas para cualquiera de los temas principales del Congreso que son : "AEU ente el Centenario del Esperanto" y el "Esperanto en Andalucía", así como la "Asamblea General de A.E.U." para que sean debatidas durante el Congreso.

- Cumplimenta y envía a Málaga cuanto antes la hoja de inscripción al Congreso para facilitar las tareas de organización. Caso de inscribirte y no poder asistir, el material te será enviado al domicilio, una vez finalizado el Congreso.

- Por último, estudia las posibilidades de ofrecer tu localidad como sede del 5º Congreso Andaluz de Esperanto, en 1987, Centenario del Esperanto.

- Hasta la presente, 5 esperantistas extranjeros(concretamente, 3 chicas de Polonia y 2 de Suecia) han anunciado su asistencia a Granada para participar en los actos de este 4º Congreso Andaluz de Esperanto.



ANDALUZIA

ESPERANTO - UNUIĜO

(A. E. U.)

ASOCIACION ANDALUZA

DE ESPERANTO

POZO, 3
41003 - SEVILLA

TRINIDAD GRUND, 28
29001 - MALAGA

APARTADO 611
14080 - CORDOBA